

# STEFANO

184-185

## El la enhavo:

Asocia konferenco  
KAEST '98 en Prago  
Junularo kaj infanoj  
Fervôjista vivo  
Kristana vivo  
Literaturo  
SAT - anoj  
Kluba vivo



## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Omaĝo al 90-jariĝo de Jaromír Babička,  
honora membro de IFEF kaj ĈEA

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 6-foje jare.  
Abono 18 gld. + 3 gld (aerpoŝto)

E-mail de Starto: starto@clavis.cz

TTT de Starto: www.clavis.cz/starto

E-mail de ĈEA: cea@tmet.cz

TTT de ĈEA: www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio,  
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por  
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla  
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%  
rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membroklotizoj:** A 200 Kč, B 100 Kč, (C  
nuligita), D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G  
130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 20  
ECU, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 490 Kč komencantoj,  
450 Kč progresintoj. Aliĝoj: Esperanto, p.s..  
1069, 111 21 Praha 1

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6,  
152 00 Praha, tel. 02/5817732

**Sekcioj de ĈEA:** infana, junulara, skolta,  
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-  
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-  
amikara, de esperantaj-kolektantoj

**Komisionoj de ĈEA:** gazetara-informa,  
ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

**ĪCO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:** 3330-021/0100,  
Komerční banka, Praha 2

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,  
747 05 Opava, tel: 0653/611 823

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso  
02.9912126

**Vicprezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí I, 603  
00 Brno, tel. 05/4323 3047

**Sekretario:** Květa Krajíčková, Esperanto, p.s.  
1069, 111 21 Praha 1

**Komitatano:** Lucie Karešová, Tylova 1262,  
508 01 Hořice v Podkrkonoší

**Komitatano:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1,  
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332  
278, fakso 0631/332 507

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na Nábřeží

45/25, 736 01 Haviřov, tel. 069/6815253

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Jana Holcová,  
Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj:  
Josef Hron, Libuše Krejčí)

**Ĉefdelegito de UEA:** Stanislava Chrdlová,  
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel.  
02.9912201, fakso 02.9912126

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724  
0690

**Lingva kontrolo:** Miloslav Pastrňák

## Variabilni simboloj pro platby ĈES

311 expedice, uhrada koupenných knih

604.2 písemné kurzy

604.3 předplatné Starto

604.5 předplatné Internacia Fervojisto

668 dary svazu

694 členské příspěvky ĈES

694.1 členské příspěvky UEA

789.1 sekce mládeže

789.10 sekce ŝachistů

789.11 sekce sběratelů

789.13 Sciencia revuo

789.15 ediční fond, Ringo

789.16 subkonta klubů mimo uvedených

789.17 Sekce nevidomých

789.19 Propagace v reg. tisku

789.3 sekce železničářů

789.7 sekce pedagogů

789.71 ILEI (+ Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilni simboloj uvdájte na přední straně  
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do  
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.  
Upozornění pro majitele účtů u jiných bank!  
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvdájte  
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK  
PRÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC  
apod. Zároveň uveďte i variabilni simboloj.  
Dojde-li platba s označením „ĈESKÝ ESPE-  
RANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme, kdo a  
proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary  
svazu.

ISSN 1212-009X

## Post la asocia konferenco

La tagojn 16-a kaj 17-a de oktobro travivis niaj fideluloj en la bela nordbohemia urbo Jablonec super Nisa. La konferenco allogis ok dekojn da reprezentantoj de niaj kluboj kaj rondetoj, kiuj aŭdis raporton de la komitato, de kelkaj sekcioj kaj kluboj kaj ankaŭ kontribuojn de unuopuloj.

La tasko de niaj ĉiujaraj konferencoj estas ne nur informi ĉeestantojn pri aktualaj kaj solvendaj aferoj de la asocio, sed - eĉ pli grave - aŭdi dezirojn kaj instigojn de la membraro kaj sekve pripensi pluajn paŝojn por plifirmigo de nia movado en naciaj kondiĉoj. En tiu



senco donas nun la postkonferenca tempo al ni jenan ĉefan taskon: bone prepari la naŭan landan kongreson okazontan venontjare. Mi kredas, ke en proksimaj tagoj la komitato kaj la jam establita elektokomisiono ricevos konvenajn proponojn pri loko kaj dato de la kongreso, ke venos multaj kandidatigoj por estontaj funkciuloj. La konferenco startigis la antaŭkongresan periodon kaj ni nun devas rapide plenigi interspacojn kaŭzitaĵn de eventuale neplenmitaj taskoj. Ni ne emu priplori malfacilajn kondiĉojn, en kiuj ni devas ekzisti, labori kaj agadi -

kvankam ofte tion niaj membroj kutimas. Ne nur esperantistoj renkontas malintereson de la publiko, laboras kun nesufiĉaj financoj sen subteno kaj atento de oficialaj politikaj medioj. Sed ni malgraŭ ĉio aktiviĝu, zamenhofe semu kaj semu, neniam laciĝante. Al tiu semado daŭra mi deziras al ĉiu nia membro senfinan obstinon kaj persiston.

VI. Kočvara

La konferencon partoprenis 85 membroj el 33 lokoj (aliĝis 95

personoj). Dum vendreda posttagmezo ĉiuj alveturis al la konferencujo kaj loĝejo - metilernejo de biĵuterio. En manĝejo ekfunkciis akceptejo kaj libroservo. Post vespera lunĉo ni ĝuis folkloran ensemblon ANKA, konsistanta el infanoj de antaŭlerneja aĝo kaj iliaj gepatroj, poste sekvis diskuto pri Montpeliero, kiun prezentis la partoprenantoj (Kočvara, Chrdle, Rýznarová k.a.). Ili klarigis, ke venontjare al UK en Berlino oni ne organizos ekskurson, ĉar en Berlino, kiel renovigata ĉefurbo, estas por ni terure multekosta loĝado.

La labora parto de la konferenco realiĝis sabate, preskaŭ dum la tuta tago. La kunvenon inaŭguris la vicprezidanto d-ro P. Chrdle per prezento de ĉeestantaj honoraj membroj (M. Bartovská, J. Hradil, D. Kočvara, L. Rýznar, P. Sittauer) kaj per minuto da silento omaĝe al la ĉijare forpasintaj samideanoj, inter ili honora membro Jan Janda.

La asocia prezidanto ing. V. Kočvara tralegis raporton pri la agado de la asocio ekde la pasintjara konferenco. Sinsekve li menciis agadon de plej aktivaj kluboj kaj rondetoj (*SET Lančov de Třebíč, Nekvasovy de Plzeň, Esperanto-Kafejo de Frýdek-Místek, infangrupoj de Česká Třebová, Oříšky kaj Opava, Kultura Festivalo en Ústí, renkontiĝoj en Šumperk, Svitavy, Přerov, Vracov, Pardubice*), kaj de sekcioj (*Sebranice de IKUE, Vina Seminario de ĈEJ, riĉa agado de fervojistoj, revekiĝanta pedagogia sekcio, poŝtmark-kolektantoj*). Atenton li dediĉis ankaŭ al la Esperanto-muzeo en Česká Třebová, al Starto kaj al eldonejo KAVA-PECH (*Ĉesko-esperantský slovník, La Badenlanda legendaro, La Besto de Vakareso, KAEST*). La asocio mem eldonis la poemon *Majo* de Karel Hynek Mácha en traduko de Tomáš Pumpr.

La sekretariino Květa Krajičková konatigis la konferencon kun la membrobazo. La asocio havas 54 lokajn organizojn (9 klubojn jure memstarajn, 21 rondetojn sen jura memstareco kaj 24 rondetojn sub aliaj organizoj), 13 sekciojn (2 jure memstarajn) kaj sume 1169 membrojn (18 honorajn, 407



*dumvivajn, 196 de kategorio A, 399 B, 60 D, 75 E, 14 nevidantoj*). La ekonomion de la asocio ni prezentos post la artikolo.

La UEA-delegitino por Ĉeĥio Stanislava Chrdlová sciigis, ke ni havas 116 individuajn membrojn de UEA (*7 dumvivaj, 28 membroj kun jarlibro kaj gazeto, 69 membroj nur kun jarlibro*) kaj 41 delegitojn.

Poste la konferencon alparolis reprezentantoj de kluboj kaj sekcioj, kiuj prezentis siajn agadojn pasintajn kaj venontajn, fine en ĝenerala diskuto ĉiu povis disvolvi siajn ideojn, kiel informi pri Esperanto la publikon aŭ riĉigi la klubajn vivojn. La estro de la gazetara komisiono D. Kočvara plendis, ke li ricevis ĉijare nur malmultajn eltondaĵojn el la ĉeĥa gazetaro, ĉar ne ĉiuj aŭtoroj sendas al li siajn kontribuojn.

Vespera dancamuzo komenciĝis per tombolo (ĉiu lotbileto gajnis) kaj daŭris ĝis noktomezo. Dimanĉe antaŭ forveturo unu grupo vizitis muzeon de bijuterio kaj la alia la urban teatron. La klubanojn de Jablonec kaj Liberec ni povas laŭdi pro bonega preparo de la konferenco.

mm



## Aktiva ĈES ke 30. 9. 1998

	31.5.1998	30. 9.1998
Hmotný investiční majetek	59 299,00	18 065,80
Drobný hmotný invest.majetek	47 128,00	47 128,00
Nehmotný majetek-software	-	3 999,00
Zboží	464 872,00	465 540,00
<i>(z toho za 100 700,00 Kč v komisi)</i>		
Pokladna	2 867,40	3 946,90
Běžný účet v KB	31 766,91	27 939,70

## „LA MONDO SEN INTERPRETISTOJ“

estis nomo de ekspozicio, kiun aranĝis E-rondeto „Amikeco“ kaj E-parto de la urba muzeo en Česká Třebová ekde la 12-a de septembro.

Komence de ekspozicio bonvenigis gepartoprenantojn direktoro de la urba muzeo kaj poste parolis pri sukcesoj kaj problemoj de Esperanto prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ing. Vlastimil Kočvara. Lia parolado estis alte taksita en loka gazeto.

La ekspozicio enkonduke montris, kio estas Esperanto, informis pri ĝia estigo, signifo, organizo monda kaj enlanda, pri merita laboro de Esperanto-parto de la urba muzeo en Česká Třebová. La dua parto de la ekspozicio estis dediĉita al praktika uzado de Esperanto precipe ĉe fervojo kaj en agado de loka E-rondeto kaj pri vigla kunlaboro kun E-kluboj el najbaraj urboj. Unu ekspozicia tabulo substrekis sukcesan lernadon de Esperanto inter gejunuloj en loka grupo. Fotoj de gejunuloj el vizitoj de Francio kaj Belgio sufiĉe konvinkis pri sukceso de Esperanto inter gejunuloj de diversaj landoj. Ankaŭ tabuloj pri internaciaj kongresoj estis allogaj.



Senditaj tabuloj sur muroj konatigis gepartoprenantojn de ekspozicio pri kontaktoj de loka E-rondeto kun diversaj landoj. Ĉiu tabulo enhavis ne nur bildkartojn kaj fotojn, sed ankaŭ skriban klarigon, kia kunlaboro aŭ travivaĵo kunligas lokan grupon kun menciita

lando. Aparta tabulo memorigis meritplenajn anojn de loka E-rondeto, nome Jindřich Štancil kaj Cilka Kotalyová, kaj ilian meriton pri evoluo de E-rondeto en Česká Třebová. Bonhumoron enhavis tabulo kun ŝercemaj fotoj el diversaj aranĝoj de rondetanoj. Ŝranketon kun pupoj en naciaj kostumoj precipe admiris infanoj, al plenkreskuloj pli plaĉis la ideo.



Ekspozicio „La mondo sen interpretistoj“ plenumis sian taskon, montris al civitanoj, ke Esperanto ne estas nur amuzo, sed ke ĝi havas sian praktikan, utilan uzadon, riĉan mondspasintecon kaj esperon pri estonto. Okaze de la ekspozicio estis eldonita glumarko.

*Jiří Pištora*

## Kunveno de najbaraj E-rondetoj en Česká Třebová

La 25-an de septembro finiĝis la ekspozicio „La mondo sen interpretistoj“ por la publiko, sed ĝi estis malfermita sabate la 26-an por reprezentantoj de proksimaj E-kluboj. Kunvenis pli ol 40 personoj, al kiuj post la trarigardo de la ekspozicio prezentis la infanoj de la loka E-rondeto, kiuj somere vizitis Belgion, sian „eksterlandan programon“. Sekvis prelegetoj pri laboro de la kluboj kaj amuza programo kun tombolo, al kiu donacis multajn premiojn la ĉeestanta Gerry el Nederlando.

## 11-a Kultura festivalo (2-4.X.1998) en Ústí

Ĉeestis 55 ges-anoj, inter ili 14 germanoj, 1 italo kaj 1 franco. Post interkona vespero sekvis prelega matineo (i.a. kun lumbildoj kaj videofilmo pri la venonta kaj pasinta UK de UEA), posttagmeze spirita ekumena koncerto en la preĝejo sub devizo „Toleremo inter konfesioj“ kaj vespere bunta kultura programo en la Domo de kulturo.

### En Pĕrrov

Sabate la 24-an de oktobro 1998 festis E-rondeto en Pĕrrov sian 75-an datrevenon. Kunvenis 78 geesperantistoj, inter ili ankaŭ ĉefdelegito de Aŭstria E-asocio L. Patek, prezidanto de Pola E-Asocio S. Mandrak kun geamikoj el Gliwice kaj la familiano



Hubert. Partoprenis ankaŭ redaktoro de ĵurnalo „Nové Pĕrovsko“. La programo komenciĝis per prelego pri la fondintoj de Esperanto-klubo kaj movado s-roj J. Krumpholt kaj T. Ĉejka. Sekvis salutoj kaj bondeziroj de niaj gastoj. Posttagmeze ĉiuj

partoprenantoj komune foriris al proksima lernejo, kie ambaŭ fondintoj instruis. Sur la muro de la lernejo devualigis vicurbestro de Pĕrov J. Valuch kaj vicprezidantino de ĈEA V. Podhradská memortabulon, kiun al la fondintoj dediĉis esperantistoj de la loka klubo. Post la komuna fotado ni revenis al la kunvenejo, kie la programo estis daŭrigata per kantoj kaj dancoj, kiujn prezentis infanoj el Česká Tĕbová sub gvidado de Zd. Novotná. La kolektivo estas konata jam en kvar eŭropaj landoj. Nia E-klubo ricevis okaze de la jubileo ankaŭ donacojn - malgrandan (25 x 30 mm) vortaron „La Clef de L' Esperanto“ (Ŝlosilo de Esperanto) kaj kalendaron por la jaro 1999, kun signifaj elstaraj datoj por E-o.

Post la diskuto je la 16-a horo finiĝis la oficiala programo, sed la amika diskutado kaj grupopa babilado daŭris ĝisvespere.

*L. kaj J. Filip*

Invitita estis ankaŭ infana grupeto el Česká Tĕbová por prezenti sin dum tiu ĉi soleno. Ni alveturis tagmeze kaj ĉeestis la malkovron de memortabulo de fondintoj de la E-rondeto, kie ni kantis. Ankaŭ posttagmeza programo en la salono komenciĝis per danco de niaj pli aĝaj E-knabinoj kaj per kanto de niaj pli junaj infanoj. Poste tuta grupeto ludis teatraĵeton pri Bono kaj Malbono.

*Zdenka Novotná*

## SKOKOVY '98

La 15-an de novembro finiĝis tradicia lingva seminario en Skokovy, aranĝita de AEH (Asocio de Esperantistoj Handikapuloj). Partoprenis 38 geesperantistoj el 17 urboj de Ĉeĥa respubliko kaj hungaroj kaj nederlandano. Partoprenantoj disveturis kun planoj por nova seminario printempe. Ĝi okazos de la 19-a aprilo 1999. Interesiĝantoj povas aliĝi de februaro 1999 skribe kun 20 Kč aŭ poŝtmarkoj de sama sumo kaj afrankita koverto por respondo al adreso: Jindra Drahotová, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav, tel. 0326/731845.

## TRADUKO EL ESPERANTO

Printempe aperos traduko de libreto „Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto“ el Esperanto al la ĉeĥa lingvo. La prezo ankoraŭ nekonata, sed ne troa. Temas pri tagaj notoj de franca biciklisto el jaroj 1924-1932. Li travojaĝis Eŭropon kaj Azion. (AEH)

## ANTAŬKRISTNASKA RENKONTO

okazos la 12-an de decembro 1998 en Petrinum, Soukenická 161, Pisek. Kunveno je la 12.30 horo, programo je la 14.00 horo. Esperanto-Klubo La Ponto Pisek invitas vin en sian amikan medion.

## ESPERANTA SILVESTRO-TAGO

lunde la 28-an de decembro 1998 en malgranda salono de la Kultura Klubo en Česká Třebová je la 19-a horo realiĝos kiel kunflugo de sorĉistinoj, magiistoj kaj miraklistoj de ĉiuj landoj realaj kaj fantaziaj. Ĉiu alfluginto devas



prezenti sin mem kaj landon, kiun li aŭ ŝi reprezentas. La plej spritaj aspektoj kaj paroloj premiotaj. Restoracio funkcios ĝis la 1-a horo post noktomezo. Flugbileto por lokaj klubanoj 100 Kč, por transkampaj neklubanoj 120 Kč. Aliĝojn akceptas (ĝis 9.12.1998) Anna Pištorová, Nové nám. 1746, 560 02 Česká Třebová. Alportu viajn kristnaskajn kukaĵojn kaj donacetojn por amikoj, ne estu Hamstr(in)oj. Agrablan veteron por via flugo deziras klubanoj de Česká Třebová.



## GIMNAZIANOJ ENTUZIASMIGIS

En iu lernolibro estis renkontita aludo pri Esperanto, sed neniu sciis, kio ĝi estas. Unu el la lernantoj rememoris, ke li konas aktivan esperantiston - kaj la gimnazio en Trhové Sviny invitis s-ron Jan Kalný el České Budějovice prelegi pri la internacia lingvo. Pluraj studentoj tuj decidigis lerni la lingvon kaj tiel en la gimnazio estiĝis rondeto, gvidata de Jan Kalný. La 35 rondetanoj havas eĉ propran vitrinon, plenan de interesajoj kaj korespondaj adresoj. Eble protagonistoj de la unuiginta Eŭropo?

(laŭ Jihočeské listy 2.11.1998)



KAEST '98 - Praha 13/15.11.1998  
**Kolokvo pri Apliko de  
Esperanto en Scienco kaj  
Tekniko**

La kolokvon, organizitan de Ĉeĥa esperanto-Asocio kiel ties kontribuajo al Kampanjo 2000 sub aŭspicioj de UEA kaj ISAE partoprenis kvardeko da personoj el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hungario, Pollando kaj Slovakio. Jam vendrede post gazetara konferenco la kolokvon malfermis prezidanto de ĈEA V. Kočvara, prezidanto de ISAE R.Sachs kaj estrarano de UEA P.Chrdle. Prelegserio estis startigita de Z. Pluhař (CZ) pri historio de AEST-oj en iama Ĉeĥoslovakio (1978 Žilina, 1980 Ústí nad Labem, 1981 Žilina, 1982 České Budějovice, 1984 Brno, 1988 Strážnice), kies tradicion volas KAEST revivigi. P. Chrdle (CZ) klarigis leĝojn pri aŭtoraj rajtoj en internaciaj rilatoj fokusigante sin al la plej gravaj internacie validaj dokumentoj, precipe Interkonsento de Bern kaj Gvidlinioj de UE-konsilio. M. Malovec (CZ) pledis por enkomputiligado de nia ĝisnuna E-literaturo, ĉar tiel povas esti savitaj kaj rejunitaj raraj malnovaj ekzempleroj kaj samtempe disponigitaj por ĉiuj sur laseraj kompaktdiskoj aŭ en interreto. L. Szilvási (HU) pritraktis la samon pri faka literaturo, celante krei elek-



tronikan fakan bibliotekon. R. Sachs (DE) ŝanĝis la temon kaj rakontis pri speciala afrika krabo, kiu anstataŭ en akvo vivas en arbo, pri kio la nigruloj kreis ĉarman fabelon. La posttagmezan programon finis B.Leonov (BG) prezentante informbarilojn en la scienco kaj patentteknika informado. La vendredan programon kaj samtempe la plenkursidon „Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko generale“ fermis amika babilado en proksima bierejo.

La sektion A „Modernaj rimedoj de komunikado, iliaj avantaĝoj kaj problemoj“ malfermis sabate antaŭtagmeze F. Nietzsche (DE) atentigante pri sanproblemoj ĉe la laboro antaŭ komputiloj, precipe rilate okulojn, sed ankaŭ en dorso, muskoloj de brakoj kaj nuko, kaj prezentis gravajn preventopropozojn. R. Fössmeier (DE) komparis ĉe modernaj komunikiloj (komputiloj, interreto) iliajn avantaĝojn (rapidan transporton de informoj, facilan kopieblecon) kun iliaj malavantaĝoj (facilan falsifikadon, sekve juran nefidindecon al elektronikaj dokumentoj) kaj montris eblojn de sekura ĉifrado por protekti la mesaĝon kontraŭ misuzo. J. Vojáček (CZ) aldonis problemojn ĉe esprimado de Esperantaj literoj en Interreto (ĉ = ch, cx, ^c, c^, c' ktp.). H.D. Quednau (DE) informis pri instru-programoj, akireblaj en interreto por subteni instruadon de diversaj stud-

objektoj. J. Wozniczka (DE) prezentis Pakedo-radion, do kontaktigon de multaj komputoroj per hejmaj amatoraj radiostacioj, simile kiel en Internet kontaktigas komputorojn telefono. R. Kurz (DE) inverse parolis pri transigo de voĉoj (radio-programoj, telefonado) en Internet de komputilo al komputilo, kiu estas pli kvalita kaj ĉefe malpli kosta ol la klasika transigo. Ĉi tiun blokon fermis la prelego de A. Lewanderska-Quednau (PL/DE) pri uzado de amaskomunikiloj por instruado de lingvoj.

Posttagmeze sekvis la sekcio B „Terminologiaj problemoj de Fakaj aplikoj de Esperanto“. Ĝin komencis D. Blanke (DE) per biografio de Eŭgeno Wüster, kiu kiel junulo tradukadis Esperanten beletron kaj revante bazi la teknikan terminologion sur Esperanto ellaboris principojn, per kiuj li fariĝis tutmonde rekonata fondinto la terminologia scienco. J. Kavka (CZ) avertis pri nesistemeco de naturscienca nomenklaturado en PIV, kies terminoj estas ofte misformitaj kaj science neuzablaj. H. M. Maitzen (AT) simile kritikis astronomiajn terminojn en PIV kaj V. Barandovská-Frank (CZ/DE) pritraktis terminojn klerig-kibernetikajn. B. Wacha (HU) prelegis pri principoj de selektado de terminoj en planlingvo kaj pri prononc-problemoj ĉe similsonaj terminoj (speco-peco, spaco-paco k.s.). M. Bartovská (CZ) prezentis riĉaĵojn de brodoj, precipe ĉe

folkloraj vestoj kaj ties terminologion. En la lasta prelego P. Hauser (DE) pritraktis terminologiajn problemojn de metalprilaboro per varmo. La sabatan programon finis komuna vespermanĝo en stila gastejo „U Bumbrličků“.

Dimanĉe post restantaj prelegoj de sabato - H. Rössler (DE) prezentis la teoremon de Pick pri area elkalkulo ĉe geometriaj formoj, kiu antaŭ cent jaroj estiĝis en Prago menciante, ke Georgo R. Pick (1859-1942), germana profesoro en Prago, samaĝulo kaj samgentano de Zamenhof, estis mortigita en Terezín. W. Blanke (DE) priskribis spertojn kaj historion de Terminologia Esperanto-Centro de UEA kaj prezentis novan broŝuron Terminologia gvidilo - en diskuto „ĉe ronda tablo“ la partoprenantoj konkludis, ke por evoluigi la fakan lingvon en Esperanto necesas unue eduki esperantistojn pri principoj de terminologia kaj vortarista laboroj (kutime oni ellaboras novajn vortarojn sen antaŭfiksataj principoj) kaj inter alie rekomendis regule daŭrigi KAEST-ojn, ĉu ĉiu jare, ĉu en dujara periodo, plej bone en ĉiam la samaj dato kaj loko.

La kolokvono organize kaj finance garantiis Kongresa kaj kleriga entrepreno de Petro Chrdle KAVA-PECH.

La programkajero de la kolokvo, kiu inkluzivas ankaŭ la resumojn de la prelegoj estas aĉetebla en la libroservo de CEA kontraŭ 15.- Kč.

## Jubileoj

### 85 jaroj

Deisznerová Marie, Dačice v Čechách  
Kincel Blahoslav, Jílová  
Kotrba Václav, Teplice-Nová Ves

### 80 jaroj

Poláchová Blanka MUDr., Český  
Těšín

### 75 jaroj

Kaletova Milada Dipl. tech.,  
Olomouc-Samotičky  
Koral František, Jablonec n. Nisou  
Reiser Josef, Nezvěstice  
Růžková Vlasta, Lázně Bohdaneč  
Szczerbowska Helena, Třinec 6  
Tesnerová Zdena, Pardubice  
Toman Jan, Jaroměř III.

### 70 jaroj

Ficnarová Zdenka Mgr., Olomouc  
Harcuba Jiří Prof., Praha 6  
Chlum Augustín, Liberec-Růžodol 1  
Pastrňáková Marie, Havřířov-Město  
Rönnforssová Milena, Česká Skalice  
Škáchová Elmira MUDr., Benešov  
Zyková Marie, Plzeň

### 60 jaroj

Antošová Marta, Děčín IX., Bynov  
Drahotová Jindřiška, Mladá Boleslav  
Páral Pavel MUDr., Ústí n. Labem  
Štěpánek Ferdinand, Šumperk

### 50 jaroj

Faltynková Blanka, Předměřice n.  
Labem  
Hájková Vlasta, Kryštofovo Údolí

Hanzl Petr, Kladno  
Krejčí Josef, Bludov  
Preclíková Hana Ing., Dobré  
Rablová Pavla, Ostrava-Fifejdy  
Srkalová Irena PhDr. Ing., Opava  
Žák Jiří, Třebíč



## Ni kondolencas

Niajn vicojn forlasis Ing. Emanuel  
Tuháček (nask.1919) el Olomouc,  
d-ro Václav Plecháč (nask.1930) el  
Praha, Oldřich Toman (nask. 1913)  
el Děčín, pentristino Věra Vovsová  
(nask. 1912) el Pardubice, Jana  
Hrušková (nask.1928) el Česká  
Třebová, Otokar Otrusina (nask.  
1911), František Buczek (nask.  
1941) kaj Jindřich Foltá (nask.  
1910) el Ostrava. Mortis honora  
membro de ČEA Jan Janda  
(19.4.1904-8.10.1998) el Kolín.

## Infanoj en Lančov 1998

Per suba foto ni volas rememorigi ĉijaran someran tendaron en Lančov, kie dudek akvaj skoltaj el Opava trapasis bazan kurson de Esperanto kaj sukcesis ĉe fina ekzameno. Granda danko apartenas al Drahomír Kočvara, kiu per sia entuziasmo kaj ludmetodo de instruado akiris por nia lingvo preskaŭ ĉiujn knabojn. Pozitiva rezulto estas, ke pli ol duono da knaboj volas kontinui en lernado en sia skolta trupo.

*Jiří Caletka*



## Infanoj de Okříšky

Okříšky estas malgranda urbeto apud distrikta urbo Třebíč, sed tamen legintoj de la regionaj gazetoj scias, ke tie ĉi jam kelkajn jarojn korespondas Esperan-

te antaŭlemejo kun samspeca lernejo en Chateauroux (Francujo). Ankaŭ gelemantoj de la elementa lernejo en Okříšky, kiuj vizitas Esperanto-rondeton, korespondas kun infanoj de la sama urbo. Ni jam informis, ke du knabinoj de la rondeto akiris premiojn de TEJO en artista desegnado „Amikoj en la tuta mondo“, nome la 5-jara Pavla Vrtalová kaj 15-jara Monika Pacholíková, kiujn prezentis ankaŭ la loka ĵurnalo „Horácké noviny“.

*Dr. Kamila Bartlová, prof.*

## Konkurso! Por mi? Por vi! Konkurso por ĉiuj infanoj!!!

Jen desegno-konkurso por ĉiuj infanoj sendepende de la aĝo!!!

La temon vi povas elekti laŭ vi mem!!

1. Disvastiĝo de Esperanto en anima regno.

2. Esperanto en la jaro 2098.

Vi konkursos en kvar infanaj aĝogrupoj kaj en ĉiu estos prijuĝita certe bela kaj certe valora premio!!

Alvenontaj desegnaĵoj estos eksponitaj dum Kongreso de CEA.

Sukceson al via kreemo, kiu estos tre grava flanko de prijuĝado! La aĝogrupoj estas kvar:

1. 0 - 6 jaroj

3. 15-29 jaroj

2. 6-15 jaroj

4. 29-99 jaroj

Viajn kovertajn kun la titolo „desegnokonkurso“ sendu al la adreso: Lucie Křešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v P.

**La konkurso finiĝas 31.3.1999!**

## Ĉeĥa Esperanto-Junularo

Saluton, karaj legantoj!

Jen en la lasta numero de Starto mi ŝatus informi vin pri agado de ĈEJ kaj oferti al vi kelkajn el niaj servoj por esperantistoj.

Dum 1998 ni okazigis du internaciajn aranĝojn - Somerajn E-kursojn por gejunuloj kaj Vinan Seminarion - kiuj ambaŭ finiĝis per tiu ĉi jaro. Ĉu portempe aŭ plene, mi ne aŭdacas diri. Junaj ĉeĥoj krome ĝuis kelkajn semajnfinojn kune dum ne grandaj kunvenoj kaj ni organizis karavaneton al Montkabana Renkontiĝo en Aŭstrio. Krome ni ofertis kelkajn servojn, pri kiuj legu sube.

Kiel kontakti Ĉeĥan Esperanto-Junularon? Uzu la samajn manierojn kiel por kontakti ĈEA!!! La adresoj:

ĈEJ Esperanto, p. 1069, 111 21

Praha 1, cea@tmet.cz -

Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v P.

### Membreco en ĈEJ por 1999

kat. A - individuaj membroj  
Individuaj membroj regule ricevas Cirkuleron kaj ili povas uzi ĉiujn ofertitajn rabatojn de ĈEJ (vidu sube por 1999).

Membrokotizo

kat. A1 - laborantaj ..... 100,-Kč

kat. A2 - ne laborantaj 65,- Kč



kat. B - ne individuaj membroj  
Ĉi membroj ricevas regule kaj senpage Cirkuleron.

Kontaktu nin!!! Vi ricevos ekzempleron de Cirkulero kun ĉiuj detaloj pri membreco.

Servoj ofertitaj pere de ĈEJ

### Pasporta Servo

Pasporta Servo estas servo de la Esperanto-movado por E-parolantoj. Ĝiaj membroj havas eblon ricevi senpagan gastadon. Ĉiu, kiu posedas propran ekzempleron de la listo de gastigantoj, estas membro kaj rajtas uzi la liston por trovi gastigon.

Kiel fariĝi membro? Aĉetu la liston de la gastigantoj kaj skribu vian nomon sur la kovrilon.

Ni supozas, ke eldono de la jaro 1999 estos je via dispono en marto 1999. Supozata prezo por ĉeĥoj estos ĉirkaŭ 80,- Kč, ĈEJ-membroj ricevos rabaton de 50%.

ĈEJ mendas nur limigitan kvanton, do vi montru vian interesigon al ĈEJ kiel eble plej frue.

**Membreco en TEJO - Tutmonda Esperantista Junularo Organizo**  
TEJO - provizos vin kiel sian individuon membron per la gazetoj Kontakto kaj TEJO-tutmonde, per aktualaj informoj pri aranĝoj de TEJO. Aliĝante pere de ĈEJ vi ricevos rabaton de 15 %. Informoj ĉe Lucie.

### TEJO/KER seminarioj

Ĉiujare TEJO kunlabore kun Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) organizas du fakajn seminariojn por junaj homoj. ĈEJ invitos TEJO-n seminariojn en Ĉeĥio dum aŭtuno 1999. Al aliĝontoj ĈEJ-anoj ni certe ofertos favorajn kondiĉojn. Aktuale en Cirkulero.

### Internacia Junulara Kongreso de TEJO

IJK 1999 okazos 9.-16.8. en la hungara urbo Zanka kun la temo *Komunikado en la informosocio*. ĈEJ preparos por interesigantoj informan subtenon laŭ aktualaj kondiĉoj.

Ĉu vi aĝas inter 15 kaj 30 kaj ankoraŭ hezitas pri membreco en ĈEJ? Ĉu vi aĝas pli kaj interesigas ricevi freŝajn informojn? Mendu Cirkuleron 1999!!!




## Vina seminario - deka kaj lasta

*Lechovice 1-4.10.1998*

Sub organiza gvido de Pavla Dvořáková kaj Jana Burianová partoprenis trideko da personoj, inter ili grupeto el Hungario kun la populara László Szilvási, redaktoro de *Evento*, unu hispana junulo studanta en Germanio kaj polaj geedzoj kun unujara filineto. Speciale kara gasto estis Věra Barandovská-Frank el Paderborn. Neforgesebla fariĝis hundo Andula de Karel Ryšánek. La hotelo funkcias samtempe kiel ĉevalfarmo kun du grandaj staloj kaj vastaj terenoj por rajdado.

La jaŭda interkona vespero estis ligita kun librovendado, la vendreda ekskurso lerte gvidata de František Havlík fariĝis minikurso pri vinproduktado kaj vespere pri vingustumado. La ekskursantoj vizitis vitejon, vinproduktejon kaj vin-testejon (vitejo, kie estas testataj novaj varioj ĝis nun en nia lando ne kultivataj). Dum vespera gustumado estis prezentitaj ĉefaj vinvarioj kun karakterzizaj koloroj, aromoj kaj gustoj.

La seminarion partoprenis ankaŭ la komitatoj de ĈEA, kiuj la sabatan programon dediĉis al sia kunsido, sed la vesperon jam ĉiuj komune travivis en vinkelo en Znojmo ĉe folkloro muziko. Posttagmeze ankoraŭ kelkaj samideanoj provis rajdeti sur du ĉevaloj sub kontrolo de knabinoj el la loka junulara rajdtaĉmento.



**SAT**

**KONGRESO**

**KARLOUVY VARY  
1999-07-24/31**

# 72-a SAT-Kongreso en Karlovy Vary - Ĉeĥa Respubliko

## Iom pri la kongresurbo:

Karlovy Vary (Karlsbad) troviĝas en ĉarma valo ĉe Teplá-rivereto kaj Ohře-rivero, ĉirkaŭigita per arbaraj montetoj.

Laŭ la legendo varmajn fontojn malkovris en la 14-a jarcento la ĉeĥa reĝo kaj Romana imperiestro Karolo la IV-a dum ĉasado de cervoj kaj fondis tie reĝan urbon. De la 16-a jarcento jam ekaperis la unuaj banlokaj domoj, urbon vizitis multaj gastoj kaj ĝi bone profitis. En la 18-a jarcento alvenis tien multaj sciencistoj kaj kuracistoj por esplori la fontojn kaj studi banlokan kuracadon. Novajn kuracmetodojn ĝis nun uzatajn enkondukis en la jaro 1722 d-ro David Becher, kiu esploris unuopajn kemiajn elementojn de la ŝprucfonta akvo kaj kompletigis trinkadon de kuracakvo per dieto kaj promenadoj en naturo. Nelaste li fondis fabrikon por produkti likvoron de lokaj kurac-herboj, nun konatan kiel „Becherovka“.

Gastis en Karlovy Vary multaj eminentuloj, ekzemple caro Petro la Granda, J.W.Goethe (eĉ 13-foje), N.Pagani, N.V.Gogol, L.van Beethoven, K.Marx, K.L.W.Metternich, A.Dvořák, K.Čapek, T.G.Masaryk kaj multaj aliaj.

En Karlovy Vary oni kuracas precipe malsanojn de digesta aparato, diabeton, malsanojn de mov-aparato kaj venas ĉi tien ofte pacientoj post komplikaj operacioj. La urbo estas konata ankaŭ pro riĉa kultura vivo, inter alie pro famkonataj filmfestivaloj.

**La kongresejo:** Kiel la kongresejo servos studenta hejmo kun apuda aŭlo de la mezlernejo, en pieddistanco de la banlok-centro.

## Kontaktadreso (tien bv. sendi la aliĝilojn):

KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice  
Tel.: (.420.2)9912201, fakso: (.420.2)9912126, rete: chrdle@kava-pech.cz  
TTT-paĝaro de la kongreso: <http://www.worldnet.fr/~sat-esp/>

## Aliĝoj kaj pagmanieroj:

La kotizojn kaj pliajn pagojn laŭ la elektitaj kaj menditaj servoj bonvolu pagi per unu de jenaj manieroj, kiujn bv. ne forgesi indiki en la aliĝilo:

- \* al la konto 555444-051/0100 (KAVA-PECH) ĉe Komerční banka Praha-Smíchov
  - \* poŝtkonto SAT n-ro 1234-22 K Paris
- ambaŭkaze kun klara indiko „72-a kongreso“

**Atentigo:** Aliĝilo al la kongreso kaj al la elektitaj servoj (loĝado, manĝoj, ekskursoj, antaŭkongreso, veturo al Berlino) validas nur post la pago de la kotizo kaj koncernaj prezoj. Kaze de malaliĝo plej malfrue unu monaton antaŭ la (antaŭ)kongreso vi ricevos vian pagon krom la kotizo kaj 10% por la kovro de administraj kostoj, malaliĝante ĝis 14 tagoj antaŭ la kongreso vi ricevos 60% de la pagoj krom la kotizo, ĝis 1 tago antaŭ la kongreso 40%, malaliĝante dum la 1-a tago de la (antaŭ)kongreso nenion.

## Uvedené ceny platí jen pro občany ČR a SR:

### Kongresové poplatky (v Kč):

Kategorie:	platba do:	98-12-31	99-03-31	99-05-31	později
člen SAT		1050	1260	1505	1750
manželé, oba členové SAT		1680	2030	2415	2800
mládež - členové SAT		525	630	752	875
nečlenové SAT		1400	1610	1855	2100
manželé, nečlenové SAT		2205	2555	2940	3325
mládež, nečlenové SAT		700	840	995	1155

Ceny ubytování. Rabatované ceny jen pro kategorii B (umyvadlo s teplou a studenou vodou na pokoji, WC a sprchy přes chodbu). Platí jen pro občany ČR a SR:

Pokud si zvolíte ubytování ve dvou- či třílůžkovém pokoji a nezbyde-li pro Vás spolubydlicí, doplatíte rozdíl v ceně při prezentaci.

Kategorie	1 místo v pokoji	Kč/noc:
B	jednolůžkovém	180
	dvoulůžkovém	130
	třílůžkovém	120

Po vyplnění zašlete přihlášku na adresu: KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

## Přihláška na 72. kongres SAT, Karlovy Vary 1999-07-24/31 (Pouze pro občany ČR a SR)

Příjmení: Jméno:

Kompletní adresa:

Tel: Fax: E-mail:

Číslo OP: Vegetarián: ano / ne



**Stravování (ceny v Kč - platí jen pro občany ČR a SR):**

je možno si objednat jen z níže uvedených možností

Jen snídaně (celkem 7x)	280.-
11 hlavních tříchodových jídel (bez „ekskursa tago“):	920.-
Plná penze (bez „ekskursa tago“):	1200.-

**Výlety během kongresu:**

<b>T - celodenní (všechny ve středu, možno objednat jen jediný z nich!)</b>	
<b>T1: PRAHA (včetně společného oběda a večeře)</b>	850.-
<b>T2: Mariánské Lázně, Františkovy Lázně, hrad Loket, včetně vstupu na hrad, oběda a večeře</b>	750.-
<b>T3: Pěšky na hrad Loket (asi 15 km), vč. oběda a jedné cesty vlakem)</b>	290.-
<b>D - Polodenní (neděle, úterý, čtvrtek, možno objednat 1, 2, nebo i všechny 3):</b>	
<b>D1: Vedená procházka lázněmi (vč. Lanovky na Dianu)</b>	50.-
<b>D2: Jáchymov (muzeum komunistického koncentráku, prohlídka města a radonových lázní)</b>	285.-
<b>D3: Klášterec nad Ohří (muzeum porcelánu v romantickém zámku)</b>	270.-

**Objednané a současně placené služby:****Kč**

Kongresový poplatek .....	.....
Noclehy v .....lůžkovém pokoji typu B, tj. 7 x .....Kč = .....	.....
(V případě 2 či 3-lůžkového pokoje s .....	)
Jídla: jen snídaně / kompletní .....	.....
Celodenní výlet T1 / T2 / T3 (možno vybrat jen jeden!) .....	.....
Polodenní výlety (možno vybrat i všechny) .....	.....
Celkem platím .....	.....

Přihlašuji se na 72. kongres SAT a současně posílám příslušnou platbu dle vybraných služeb a data úhrady na účet 555444-051/0100, variabilní symbol 724.

Jsem si vědom, že přihláška i objednávka příslušných služeb jsou platné až po uhrazení příslušných poplatků.

Místo a datum:

Podpis:

## 100 jaroj de Eugen Wüster

La monde rekonata fondinto de la terminologia scienco estis esperantisto, kion la „ekstera mondo“ preskaŭ ne scias. Lia ĉijara datreveno estis bona ŝanco konatigi la publikon kaj kun la personeco de Wüster kaj kun lia esperantisteco.

Eugen Bernhard Caspar Wüster, doktoro-inĝeniero, naskiĝis la 10-an de oktobro 1898 en la aŭstra Wieselburg. Jam kiel junulo li esperantigis plurajn verkojn: *La efiko de la U-boata milito*

(1917), *Pilorio* (1917), *La germana inteligentularo* (Kabanov, el la rusa, 1917), *La Kantistino* (Hauff, 1921), *Petro Schlemil* (Chamisso, 1922) kaj verkis traktajn *La lastaj tagoj de l'Majstro* (1921). Samtempe li meditis, kiel utiligi Esperanton por internacia normigo de tekniko. Ni povas supozi, ke sen Esperanto la terminologiaj principoj, kiuj lin famigis, ne estus formiĝintaj. Liaj rezonadoj rezultigis germanlingvajn verkojn pri terminologio, en kiuj li dediĉis gravan atenton al Esperanto: *Die Bedeutung der Welthilfssprache Esperanto für den Techniker* (Signifo de monda helplingvo Esperanto por Teknikisto, 1921), *Die Verhältniswörter des Esperanto* (Prepozicioj en Esperanto, 1923), *Internationale Sprachnormung in der Technik* (Internacia lingvonormigo en la tekniko, 1931). La lastan verkon esperantigis Emil Pfeffer kaj eldonigis en 1936 en Budapeŝto sub titolo *Konturoj*

*de la lingvonormigo en la tekniko*. En 1935 rusigis la verkon alia grava esperantisto Ernest Drezen, kiu tiamaniere fariĝis fondinto de la soveta terminologia skolo. Wüster klopodis realigi siajn ideojn ankaŭ kiel vortaristo, unue en *Maŝinfaka Esperanto-Vortaro* (1923), poste en impona *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana* (ekde 1923), kies partoj aperadis dum pluraj jaroj, sed duono restis en manuskripto kaj atendas eldonon.



Post la milito li iom kometis ankaŭ kun la helplingvo Interlingua, sed ankaŭ al Esperanto li restis fidela ĝis sia morto 1977.

Estas bedaŭrinde, ke ĉeĥaj enciklopedioj tute ne mencias la personecon de Wüster. Sole en la libro *O české terminologii* (Pri la ĉeĥa terminologio, Praha 1983) oni skribas sur la p. 85, ke la Internacia Normiga Organizo ISO „labo-

ris surbaze de ideoj kaj spertoj, kiujn en sia laboro Internationale Sprachnormung in der Technik sumigis profesoro Eugen Wüster (Berlino, 1931).“ En *Terminology Manual* (Paris, 1984), kiun eldonis angle Infoterm (Internacia Informa Centro por Terminologio) estas menciitaj 18 verkoj de Wüster kaj unu de Ernest Drezen, sed pri Esperanto eĉ ne unu vorto. Estas do tasko de ni esperantistoj prizorgi, ke la rolo de Wüster, Drezen kaj Esperanto estu en la publiko pli bone konata.

## Festeno omaĝe al Jaromír Babička

Vendrede 28.8.1998 en la Registara salono de la fervoja stacio Praha - la Ĉefa Stacio - okazis solena kunveno omaĝe al la 90-jariĝo de dojeno de la ĉeĥaj fervojistaj esperantistoj kaj honora membro de IFEF Jaromír Babička.

La jubileulo pro sia agado por kaj pere de Esperanto estis en kvindekaj jaroj kiel spiono kaj perfidanto de nia tiama socialisma ŝtato kondamnita al dudekjara puno en peza malliberejo. Li travivis 4 terurajn jarojn sendita en plej malbonan malliberejon, laborante en misfame konata uranminejo Jáchymov. Dank' al la streboj de la familianoj kaj amikoj oni permesis revizion de la proceso, sekve de tio oni poste ŝanĝis la kondamnon kaj liberigis lin. Malgraŭ malfaciloj li denove komencas labori kaj ankaŭ agi por Esperanto, krom alia li funkciis kiel instruisto en multaj Esperanto-kursoj. Dum la 43-a IFEF-Kongreso en 1991 en Olomouc li estis pro meritoj pri Esperanto honorigita kiel „Honora Membro de IFEF“.

Inter multaj alvenintaj gratulantoj estis ambaŭ honoraj prezidantoj de IFEF Per Engen (Norvegio) kaj Joachim Giessner (Germanio), IFEF-kasisto Henning Hauge kaj ges-roj Olsen el Danio, UEA-reprezentanto doc. Petr Chrdle, ĈEA-prezidanto inĝ. Vlastimil


Kočvara, reprezentanto de Ĉeĥaj Fervojoj kaj sekretariino de Ĉeĥa LA de FISAC PhDr. Anna Abelovská, prezidanto de Ĉeĥa LA kaj Ĉk de IFEF Jindřich Tomášek kaj aliaj. Dum gratulado la ĈEA-prezidanto transdonis al li diplomon kun honora membreco en ĈEA. Poste oni festenis kun la jubileulo rememorante kaj babilante, eĉ kantante E-kantojn. Al la kultura programo krom alia kontribuis ankaŭ konata praga aktorino Eva Seemannová, kiu emocie monologe prezentis du leterojn el la verko Eŭgen Onegin de Puŝkin.

Indas mencii, ke Pola Radio elsendis la 18-an de aŭgusto 1998, en sia programo „Kanzono kun amikaj mesaĝoj“, jenan mesaĝon al la jubileulo: „Atenton, s-ro Jaromír Babička, honora membro de IFEF, Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, loĝanta en Dobřichovice, en la Ĉeĥa Respubliko!

En la nomo de la landa asocio de IFEF salutas vin la ĉefkomitatano de IFEF, s-ano Jindřich Tomášek, kiu gratulas vin kunlige kun via 90-jariĝo, kaj sincere dankas al vi pro ĉio farita por Esperanto, por nia sekcio kaj por IFEF! Mi deziras al vi firman sanon kaj vivo-optimismon dum ankoraŭ multaj, multaj jaroj!“

Similan gratulon elsendis Radio Aŭstria Internacia la 23-an de aŭgusto 1998, en „Dezirmelodioj“.

*Jindřich Tomášek*



## Jarkunveno de FS ĈEA

Ĉeĥa landa sekcio de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) kunlabore kun Landa Konsilio de FISAIC ĈD aranĝis en la tagoj de la 25-a ĝis la 27-a de septembro 1998 en Liberec sian 32-an jarkunvenon. Inter eksterlandaj gastoj estis ankaŭ honora prezidanto de IFEF sinjoro Peer Engen el Norvegio.

En la raporto pri la aktiveco de la pasinta unujara periodo, la prezidanto de la sekcio substrekis precipe la fakton, ke oni sukcesis realtigi nombron de la ĉeĥaj IFEF-membroj kaj abonantoj de la asocia revuo Internacia Fervojisto, ĝis nunaj 69 kompare al lastjaraj 34. En la ĉeĥan fervojan horaron revenis klarigoj en Esperanto. Niaj delegitoj kaj membroj krom alia partoprenis Internacian Zamenhof-Feston kun samtempa gvidekskurso tra O.R.F.-centro dum la lasta decembro en Vieno, februaran Fervojistan Esperantan Skisemajnon en Maribor (Slovenio), aprilan Printempan Konferencenon kun ekskurso „Laŭ spuroj de la ĉevaltrakcia fervojo Budweis-Linz” en Velešín kaj Summerau, 50-an IFEF-Kongreson en Aalborg en Danio, Tutlandan Amikan Renkontiĝon de hungaraj fervojistaj kolegoj en Debrecen, 13-an Ekumenan kongreson de IKUE-KELI en Nantes en

Francio, 83-an UK de UEA en Montpellier, tre sukcesan Festenon omaĝe al 90-jariĝo de sinjoro Jaromír Babička, honora membro de IFEF kaj ĈEA fine de aŭgusto en Praha kaj aliajn aktivadojn de la sufiĉe vasta agado. Pli boniĝis kunlaboro de la fervojista sekcio kun Landa Konsilio de FISAIC ĈD, kiu taksas esperantistan sekcion kiel la plej aktivan el ĉiuj sekcioj de FISAIC kaj subtenas nian agadon.

Prelego „Fremda, tamen nia” fare de la prezidanto prezentis historion kaj nuntempon de la neordinara fervoja linio Liberec-Zittau, kun itinero de Liberec tra parto de Pollando ĝis Zittau en Saksujo.

Dum sabata posttagmeza ekskurso post trarigardo de la stacio en Zittau unu grupo vizitis la urbon, la alia traveturis la raran privatman mallarĝspuran fervojan linion kun larĝoŝpuro 750 mm de Zittau al Kurort Oybin kaj reen en speciala gastvagono en trajno kun vapora lokomotivo 99 758.

Venontjara Printempa Konferenco okazos aprile en Strážnice, la aŭtuna jarkonferenco verŝajne en Tábor.

Abono por *Internacia Fervojisto* (6 ilustritaj numeroj jare) kun membrokotizo por IFEF por 1999 estas minimume 100 ĉeĥaj kronoj. Ni akceptas eĉ nefervojistojn, petu poŝtpagilon de sekretario inĝ. Jiří Vencl, Nové náměstí 1745, 560 02 Česká Třebová. (jt)



## Ĉe la sennaciuloj

Laŭ Eŭgeno Lanti sennaciulo estas homo, kiu ne nur aprobas sennaciismon, sed plie sukcesis senigi sin je prefero por la lando, kie li naskiĝis kaj kies civitano jure kaj devige li estas; homo, kiu havas geamikojn en ĉiuj mondpartoj kaj sopiras jen al Berlino, jen al Buenos Aires, jen al Moskvo, jen al Parizo, jen al Stokholmo, jen al Tokio, ktp.: homo, kiu scipovas pli bone Esperanton ol sian gepatran lingvon.

Iam en la jaro 1950 aŭ 1951, kiam mi vivis en la franca urbo Le Creusot, kaj laboris tie en fandej-forĝeja uzino, ni havis en nia ĉambro junan esperantiston Sobota el Slovakio. Antaŭ sia forveturo li donacis al mi „Kliĉ jazyka esperanto“ (ŝlosilon de Esperanto por ĉeĥoj), kaj du adresojn de esperantistaj organizoj. Iu franco luis al mi sian montardometon izolitan en arbaro kaj tie mi komencis lerni nian lingvon.

Helpe de la ŝlosilo mi skribis du leterojn, unu al UEA en Londono, la duan al iom stranga adreso „Sennaciulo“ en Parizo, kaj kun senpacienco mi atendis la respondojn. Post kelkaj tagoj mia letero al Britio revenis kun mencio, ke tiu asocio jam ien transloĝiĝis. Sed el SAT-oficejo krom letero alvenis ankaŭ gazeto, kiun mi tuj abonis, kaj libro-katalogo, laŭ kiu mi mendis libron „Manifesto de la sennaciistoj“, kiu poste fariĝis mia sola lerno-libro.

Kompreninte ĉion, mi rememoris, kion rakontis al mi mia patro dum mia infanaĝo, kaj trovis, ke la ideoj de Lanti kaj de mia patro estis preskaŭ samaj,

kvankam la patro ne estis esperantisto.

En la jaro 1953 mi aliĝis al SAT.

En la sama jaro trafis min grava akcidento kaj pro miaj kripligintaj piedoj mi decidis la 4-an de januaro 1956 enpleniĝi mian valizeton kaj forveturi al Parizo. Post senhejmeca periodo kaj havinte diversajn laborokupiĝojn, mi komencis labori kiel metia prizorgisto en la granda hotelo Ambassador, deĵorante nur nokte, sen ia ajn escepto (ekde aŭgusto 1959 ĝis majo 1963).

Tio estis por mi la plej ĝuinda periodo de mia vivo, ĉar liberan tagon mi povis fruktedone uzi laŭ mia plaĉo. Forlasinte matene la hotelon, unue mi preskaŭ ĉiam iradis al SAT-oficejo por babili aŭ helpi al niaj amikoj Banje kaj Bartelmes. Nur posttagmeze mi enlitiĝis. Ĉiusabate okazis grupkunvenoj en la Laborborso, kaj ĉiudimanche ni renkontiĝadis ĉe nia amikino Susana, kiu nin gastigis en sia Meudon-arbaro. Venadis ankaŭ pluraj alilandanoj kaj neniu krokodilis.

Prave iam skribis Zamenhof en letero al Kofman (1901): „Se eĉ ĉiuj akademi-oj de la mondo akceptus Esperanton ... nenio garantias, ke en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! Lingvo internacia fortiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos tia grupo da homoj, kiuj akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, **heredan.**“

SAT ĝuste celas konsistigi tian homan grupon.

*Adolf Veselý*

## ✉ Korespondi deziras ✉

■ Emerita fluginstruktoro deziras korespondi tutmonde pri aviadiloj, aviadilmodeloj kaj antikvaj aŭtomobiloj: Celso Fonseca Jr., Rua do Tiradentes 1183, BR-13215-371 Jundiaí SP, Brazilo.

■ Transdonu mian retleteron al viaj junaj esperant-amikoj. Mi preferas retan korespondadon, sed ordinara poŝto ankaŭ eblas: Isacir Andreoni, Octacélio Dias Fernandes, 26, 14400590 Franca, Brazilo, rete: andreoni@hotmail.com

## 📻 INTERRETE 📻

■ Pola Radio informas pri vintrotempaj frekvencoj:

06.30 h. - nur per satelito

15.30 h. - 41,18 m; 41,09 m; (7285, 7305 kHz) + satelito

20.00 h. - per satelito kaj 41,64 (7205 kHz) kaj 49,22 (6095 kHz)

22.30 h. - 40,93 m; 41,27 m; 49,22 m 49,71 m

per mallongaj ondoj (7330, 7270, 6095 kaj 6035 kHz)

<http://www.radio.com/pl/piatka>

■ Interlingvistikaj Studoj sukcese startis en Poznan inter la 24-28-a de aŭgusto 1998 en la Lingvistika Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznan (Pollando). La regiona gazeto Glos Wielkopolski, la Poznana kabla televido WTK kaj 3 lokaj radiostacioj raportis pri dek gestudentoj (el Germanio, Nederlando, Belgio, Makedonio kaj Pollando), kiuj aktive partoprenis la intensajn kursojn pri generala kaj esperanta fonetiko, teorio kaj praktiko de komunikado kaj

enkonduko en esperantan kulturon.

■ **Malfermiĝis Esperanto-Kafejo en Montrealo** - La posedantino, S-ino Julie Martel, kvankam neesperantistino, elektis tiun nomon por substreki sian emon oferti manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el diversaj partoj de l' mondo.

■ **La Esperantista Kultur-Centro Kvinpetalo** en Bouresse, apud Poitiers, Francio, proponas staĝojn pri jurnalismo, didaktiko kaj pedagogio, praktiko de la lingvo kaj iniciado al diversaj naciaj lingvoj, pere de esperanto.

■ **"Heroldo"** reiros al sia legitima posedanto, ĉar la nova redakcio sub Itala Interlingvistika Centro en Milano ne respektis la tradicion servi kiel informilo pri la movado, sed faris el Heroldo propagandilon de privataj teorioj, ekde komenco de 1999 la gazeto revenos al sia neprofitcela organizo „Heroldo de Esperanto“.

■ **Esperanto denove en La Laguna**, (Kanariaj Insuloj, Hispanio). Post forpaso de Juan Regulo nur nun societo ESTO preparis en Universitato kurson por instrui Esperanton.

■ **Universitato de Napolo** okazigis de la 23a ĝis la 25a de oktobro seminarion pri arkitektaj temoj. Studentoj pri arkitekturo parolantaj Esperanton ricevis senpagan eblecon diskonigi pri la studsistemoj en siaj landoj.

■ **Kompaktdiskoj kaj videokasedoj pri Ivo Lapenna** urĝas. La 5-an de novembro 1999 oni povos celebri la 90-jaran datrevenon de prof. d-ro Ivo Lapenna, "la konstruinto de la moderna Esperanto-Movado", nia plej granda oratoro. Feliĉe ekzistas multnombraj

registraĵoj kun liaj paroladoj kaj prelegoj, ankaŭ kelkaj videofilmoj pri li, kvankam ne profesiaj, sed la registraĵoj dum la tempo difektigos. Profesiuloj devus transformi ilin al kompaktdiskoj, por kio la "Fondajo Ivo Lapenna" kolektas monon ĉe la kasisto: Jimmy Stryhn Meyer, Pĉk. Koebenhavn 1190601; bankkonto: Den Danske Bank 4180892648; UEA-kodo: FILP-O.

■ **KLAS-1TM - kopirajtoj, varnomrajtoj, licencoj**, la unua internacia registra kaj monitora organizo fondita por protekti la posedrajtojn de kopirajtaj kaj varnom-rajtaj posedantoj, licenculoj, licencitoj, fabrikantoj kaj distribuantoj kaj la unua internacia komerca organizo utiliganta Esperanton kiel oficialan lingvon. E-mail: GARDRAJT@AOL.COM

■ **TEJO-kongreso 2000** verŝajne en Honkongo - ankoraŭ ne tute definitive decidis la oktobra kunveno de la estraro en Roterdamo.

■ **50-j Belartaj Konkursoj** - la jubileaj konkursoj okazas laŭ la samaj kondiĉoj kiel ĉiujare.

■ **UK Berlino rapide kreskas**. Ĝis la 10-a novembro aliĝis jam 1268 personoj.

■ **Unuhora filmo pri Esperanto en Nederlanda televido** de Thomas Doebele kaj Maarten Schmidt titolita "La postlasaĵo de doktoro Esperanto" estis elsendita la 8-an de novembro, dimanĉe je 21.10, de tutlanda TV-kanalo.

■ **UEA eldonis gvidlibron de Unesko pri homaj rajtoj** por ĝustatempe omaĝi la 50-an datrevenon de la Universala

Deklaracio de Homaj rajtoj (Leah Levin: Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj. El la angla trad. Edmund Grimley Evans.)

■ **Finfine ampleksa Esperanto-vortaro por araboj** - Georgo Abraham: Klara vortaro Esperanta-araba. Rotterdam: UEA, 1998. 308p.

■ **Nova Unesko-libro pri kulturo aperis ĉe UEA** - Mervyn Claxton: Kulturo kaj evoluo. El la angla trad. Johano Rapley, 1998. 60p.

■ **Aperos la granda vortaro Esperanto-Germana** de prof. Erich-Dieter Krause el Leipzig. La antaŭmenda prezo (Subskriptionspreis) estos 68,- DM kaj sendokostoj de 2,50 DM (en Germanio). Rolf Beau skribis, ke eldonas ĝin „lingvistika eldonejo en Hamburg“. Laŭ la planoj havos la vortaro 900 paĝojn kaj aperos dum la venonta printempo.

■ **La ĉea sudsveda ĵurnalo Sydsvenskan** komencis kunlabori kun Sveda Esperanto-Federacio (SEF) kaj ĝia interreta Kiosko:  
<http://sydsvenskan.se/links/kiosken.html>.

■ **Deviga kanto en Esperanto** ĉe la 10-a Korusa Festivalo en Malto. La Organiza Komitato (Sekcio de la Malta Turisma Organizaĵo) decidis elekti specialan kanton en Esperanto kiel la devigan, kiun ĉiu partoprenanta koruso devas kanti, ĉar por internacia festivalo taŭgas kanti muzikajon en la internacia lingvo. La festivalon partoprenis korusoj el 11 landoj: Rusio, Anglio, Krotailo, Litovio, Polio, Wales, Germanio, Francio, Israelo, Japanio, kaj Malto.

■ **La Eŭropa Komisiono** ellaboris proponon de regularo por subteno de kulturaj aranĝoj dum la periodo 2000-2004. Ĝi celas i.a. „reciprokan konon de kulturo kaj historio de la eŭropaj popoloj.. stimulon de kultura dialogo..“ Antaŭvidita buĝeto por 4 jaroj estas 167 milionoj da ekuoj.

■ **Esperanto-fiziko en Internet** estas trovebla ĉe adreso <http://fiziko.org> kaj prezentas artikolojn, terminarojn kaj aranĝojn de diversaj fizikaj temoj.

## Konferenco de SAT-amikara sekcio de ĈEA

La 7-an de novembro 1998 okazis en Prago konferenco de SAT-amikara sekcio de ĈEA, kiun ĉeestis 17 partoprenantoj.

Post la raporto de la prezidanto Vladislav Hasala pri la agado de la sekcio ekde la lasta konferenco en 1994 estis legataj pluraj salutleteroj, inter alie de ĝenerala sekretario de SAT Krešimir Barkoviĉ, kiu planis partopreni, tamen pro neaatendita grava malsano en la familio devis rezigni pri persona ĉeesto.

Petro Chrdle sekve prezentis prepaŝojn de la 72-a SAT-kongreso 1999 en Karlovy Vary (rigardu informojn kaj aligilojn enmetitajn meze de la kajero).

Dum diskuto oni traktis plejparte la antaŭjuĝojn koncerne SAT-on kaj rilatojn inter SAT kaj UEA, kiuj dum lastaj jaroj konsiderinde pliboniĝis.

Ankaŭ estis elektita nova sekcia komitato: malnovnova prezidanto Vladislav Hasala kaj membroj Miroslav Seve-

ra kaj Václav Stibůrek.

Interesa diskuto daŭris neformale eĉ post la fino de la kunveno dum gvidata promeno tra praga historia centro kaj dum la amika bierumado en la bierejo U Mašínů sur Malnovurba placo.

## Chcete se rozmluvit v esperantu? Jeďte v březnu do Prahy!



Pedagogická sekce našeho svazu pořádá ve dnech 5.-7. března 1999 v Praze tzv. „Paroligaj kursoj“, které jsou určeny pro ty, kteří nemají možnost rozmlouvat v klubech nebo v rodině a chtěli by se pocvičit v mluveném esperantu. Počítáme např. s absolventy písmených kurzů nebo těmi, kteří sice do klubu chodí, ale mluvit si netroufají. Zájemci pište na adresu: Jana Melichárková, 696 02 Ratiškovice 938, tel. 0628/367 404.



## 13-a Ekumena kongreso de IKUE-KELI en Nantes

„Toleremo, repaciĝo, libereco“ estis temo de la 13-a Ekumena Esperanto-kongreso, kiu okazis en Nantes, Francio, 25.VII.-1.VIII. 1998. Ĝi estis samtempe 51-a kongreso de IKUE kaj 47-a de KELI. El Ĉeĥio alvenis tri delegitoj.

La enhavo rilatis al la Nantes-edikto (1598) kaj la Dua Ekumena kunveno en Graz (23-29. VI. 1997), ambaŭ faktoj tre gravaj en la historio.

Kvankam la partoprenantoj alvenis el 16 landoj kaj el diversaj katolikaj kaj aliaj kristanaj religioj (eĉ el Malajzio kaj Sudafrika Respubliko, dum Litovoj ne ricevis la vizon por Francio), la religia toleremo inter la partoprenantoj (laŭ miaj spertoj) estis centprocenta. Tiuj, kiuj ne emas toleri la aliajn, ne alvenis. Estas vera tragedio de la homaro, ke ĝis nun tiaj netoleremoj multas en la mondo. La esperantistoj faris la unuan paŝon, pri kiu atestas jam la 13-a IKUE-KELI Kongreso.

La programo de la kongreso estis varia kaj ne konsistis nur el preĝoj, diservoj kaj meditoj. Krom multaj interesaj prelegoj kaj diskutoj en laborgrupoj, jarkunvenoj de KELI kaj IKUE kaj naciaj jarkunvenoj okazis

ekzemple ĉiutagaj joko-ekzercoj kun Vera Tuinder-Dekher, folkloro danco kun Grete Burkhardt, komunaj kantadoj de religiaj kaj eĉ nereligiaj kantoj kun Adolf Burkhardt kaj Albrecht Kronenberger, ankaŭ distraj programoj kaj gaja adiaŭa vespero en la Kongresa salono en Les Naudières.

Dum ekskursoj oni vizitis Kastelon kaj ekspozicion pri la Edikto de Nantes, partoprenis imponan koncerton de preĝeja muziko en la preĝejo de Saint Donatien en Nantes, bazilikon de la sankta Louis-Marie de Montfort en St. Laurent sur Sèvre, Muzeon de la Francaj Protestantoj de Lésquest, ankaŭ plaĝon sur bordo de Atlantika oce-

ano k.t.p.

Laŭ propono de la Ekumena Komisiono la Estraranoj de IKUE kaj same de KELI decidis kunvoki la Kristanan Esperantistaron je 1999 al la 14-a Ekumena Kongreso en pola Gliwice, 7-14 de aŭgusto 1999, do tuj post la UK en Berlino. Samtempe kaj samloke okazos la 3-a junulara Esperanto Tendaro JET '99.

Aliĝilojn kaj informojn bonvolu peti de s-ro St. Mandrak, str. Kormoranów 39/16, PL-44114 Gliwice, Pollando. *Jindřich Tomíšek*





## KRISTNASKA DONACETO: du rakontoj el novaj libroj



### Kial la koboldo Popelo fantomas

Laŭ legendo el la tempo antikva loĝis en la kastelo Hohenkrähen troriskema aŭdaculo nomiĝanta Johano Kristofo Popolius Majer. Li estis naneske kripla malfortulo, tamen sovaĝa kiel diablo kaj kvazaŭ viva vinujo.

Iam venis el Ŝvabio monaĥestro, kiu deziris tranokti en la kastelo. Popelo afable bonvenigis lin, kaj laŭ malnova germana kutimo ili senbride festenis kaj drinkadis. Spritemo kaj ŝercemo ŝprucis kaj spicis la ĝuon, ĝis subite la vingaja humoro ŝanĝiĝis al kverelo. Responde al krude ofenda ŝerco la korpulenta monaĥestro replikis al sia gastiganto, ke li ne fanfaronu, ĉar li similas al ostulo, kiu povas esti tirata tra trueto de kudrilo. Furioza pro tiu insulto Popolius abrupte ekstaris, vokis siajn servistojn kaj ordonis al ili jeti la frokulon en plej profundan kelon por tiom longe, ĝis ankaŭ lin oni povos tiri tra trueto de kudrilo.

La monaĥestro estis liberigita ne antaŭ ol lia tuta graso forfandiĝis. Tuj poste li rapidis kiel rabia al sia monaĥejo, ŝaŭmante pro furiozo. En abateja biblioteko li trovis malnovan libron pri sorĉarto, per kiu li malbenis sian gastiganton, kaj tiu baldaŭ poste mortis en akcidento. Ekde tiam koboldo Popelo maltrankviligas tiun regionon per fantomado kaj petolado.

*(el Badenlanda legendaro)*

### Besto en marĉejo

La postan tagon mi denove surseliĝis por reserĉadi, kaj, se eble, kapti mian predon. Mi atingis la bordon de la marĉo, rajdante orienten kaj iomete suden.

La tramonta vento jam fariĝis iom pli forta; la kruda aero antaŭanoncis noktan froston. Levinte mian kolumon, kaj surkapiginte la vintran ĉapon por ŝirmi miajn orelojn, mi estis rajdanta kun la vento en la dorso. La ĉevalo subite flankensaltis kaj haltis ronkante, kun la kvar kruroj streĉe rektaj; ĝi preskaŭ falis, por eviti ian malhelan beston, kaŭrantan en la plej densa parto de la kanejo.

Tra la interplekto de la kanoj, mi tre malfacile distingis dorson kovritan de felo hirta, seka, rufaĉa, kaj du postkruojn kun fendaj hufoj, kiujn mi kvazaŭ rekonis. Sed tuj poste mi sentis miajn harojn stariĝi sub mia ĉapo; ŝvito frosta kiel glaciakvo ekfluis laŭ mia dorso, kaj mia mano nevole premegis la hararon de la ĉevalo, tiom proksima de sveno mi estis. La kapo, turniĝinte, montris homaspektan vizaĝon kun milda pacema rideto:

„Nu, homo, ne konsterniĝu. Mi ne estas la Diablo, kiun vi timas. Vi estas kristano, ja; sed mi ne estas ia demono.“

La Besto kapablis paroli!

*(el La Besto de Vakareso)*

## Terminaro de feloj

Ĝus aperis en la eldonejo KAVA-PECH Terminaro de feloj verkita de Lubomír Štředa. Ĝi enhavas difinojn en Esperanto kaj en la ĉeĥa kaj tradukojn de la terminoj en la angla, la germana, la hispana, la rusa kaj la slovaka lingvoj. Temas pri kompilaĵo de fakaj normoj, kiujn la aŭtoro uzadis dum sia laboro kaj plejparton eĉ mem verkis.

La verko estos interesa certe ne nur por peltistoj, sed ankaŭ por ĉiuj, kiuj okupiĝas pri terminologio aŭ pli profunde pri la internacia lingvo Esperanto.

La terminaro estas jam havebla en la libroservo de ĈEA, ties prezo estas 126.- Kč.

Petro Chrdle

## En la Praga PEN-klubo sonis Esperanto

La 19-an de novembro 1998 en la Praga PEN-klubo okazis aŭtora vespero de poezio pro dulingva eldono de poemaro „Ekaŭdi la animon“ de Věra Ludíková kun paralelaj tradukoj en Esperanton zorge preparitaj fare de la tradukistoj Miroslav Malovec kaj Jaroslav Mráz.

Mi havis la honoron enkonduke mal-longe prezenti Esperanton kiel literaturan lingvon. Estas klare, ke mi ne forgesis atentigi la ĉeestantojn pri la esperanta sekcio de PEN-klubo, nek pri iuj gravaj trajtoj de Esperanto. Al interesatoj ni disdonis ĉeĥlingvan informfolion pri Esperanto kun kontaktadreso al Ĉeĥa Esperanto-Asocio, redaktoro de

Starto kaj mia eldonejo, kiu ankaŭ eldonas esperantajn librojn.

En la ĉefa parto de la programo sonis la versoj el la poemaro, ĉiam dulingve, ke ĉiuj povis ĝui la samajn tekstojn, kaj en la ĉeĥa, kaj en Esperanto. Sed sonis ankaŭ kantoj en plenumo de kantisto de Nacia Teatro en Prago Josef Vích, kiu krome deklamis la versojn en Esperanto, dum la versojn en la ĉeĥa deklamis alterne la aŭtorino kaj Jan Hrubeš, ĉeĥa aktoro kaj redaktoro de la radiostacio VOX. La artan impreson kompletigis Kristina Maltová flutludante.

La prezentita kvara poemaro de Věra Ludíková (la unua tradukita esperanten) forte efikis per impreso de plena koncentriĝo al la interna vivo kaj per trankviligita medito pri la ekstera mondo.

Estis vera ĝuo ĉeesti. Sed la plej grava valoro laŭ mi estas, ke Esperanto denove sukcese eliris la verdan getton, ĉar en plenigita salono pli ol duono de la aŭskultantoj estis neesperantistoj, kiuj povis per interesa formo konatiĝi kun Esperanto. Kaj tio okazis danke al poetino-neesperantistino.

Petro Chrdle

Věra Ludíková

## Amoko kaj Amoro

Amoko kaj Amoro  
najbarproksimaj en aboco  
estas formoj de frenezeco de detruado  
kaj amo. Amoro kaj Amoko  
je la alia ŝanĝiĝas,  
indiferenteco estas indiferenteco.

tr. Jaroslav Mráz

## Nia lingva ponto

Kiam post Kristnasko 1997 mi ekvidis en Opava elpresitan esp. tradukon de Majo, mi dissendis ĝin eksterlanden kiel novjaran donaceton. Laŭ peto de mia japana amiko Kurisu Kei ricevis ĉi tradukon ankaŭ du ĉinoj: s-ro Shi Chengtai, poeto kaj redaktoro de esp-literatura revuo „Penseo” kaj s-ro Mao Zifu, juna mondfama esp-poeto, handikapulo. Baldaŭ poeto Mao verkis recenzon pri Majo por Penseo kaj redaktoro Shi verkis poemon Majo honore al K. H. Mácha por la revuo Fonto. Sed la plej agrabla informo por mi estas fakto, ke s-ro Shi tradukis Majon ĉinlingven. Ĝi baldaŭ aperos paralele ĉine kaj Esperante.

Se poeto K. H. Mácha sciis pri tio.

Jaroslav Žák



## Majo

al K. H. Mácha  
Shi Chengtai

Post frost' subite venas hela majo,  
lazur' sur norda ebenaĵo vastas.  
Dum amsezono kvere turtoj hastas,  
en lag' burĝonas vigle fiŝa fraĵo.

Flirtas sur ĉarmulinoj luksa fajo,  
altaj domegoj ĉe la bord' bombastas;  
ĉu la moderna Am' ankoraŭ ĉastas?  
Sur horizonto restas nur kamajo.

Verda arbaro freŝas regione,  
furzaĉ' de aŭtoj grandiozas fone,  
apenaŭ aŭdiĝas idilio.

Politikistoj pozas sur 1' ekrano  
televidila almozdome trone;  
por la libero vane kvakas rano.

(majo 1998)

Nova libro el Kroatujo

## BARKOJ el AKVO

elektitaj kroataj noveloj 1970-1995,  
246 p., 19.80 gld ĉe Libroservo de  
UEA. La libro prezentas tradukojn de  
22 rakontoj de nuntempaj kroataj  
verkistoj (la plej juna aĝas 29 jarojn)  
kaj kompletigas la imponan anto-  
logion *Moderna Kroata Prozo* eldo-  
nitan en 1979. Ni povas nur envii, ke  
niaj slavaj parencoj scias tiel brile  
propagandi sian nacian literaturon.

## Novaj libroj en Libroservo de ĈEA

3.21 **B. Phillippe:** *Badenlanda legendaro de la Konstanca Lago.* (126 Kč)

3.22 **J. Foglar:** *La Knaboj de la Kastora Rivero.* (50 Kč)

3.23 **J. d'Arbaud:** *La besto de Vakareso*

4.07 **K. H. Mácha:** *Majo* (62 Kč)

6.13 *Eŭropa Kalendaro 1999-2000*

(100 Kč) Popisy zemí Evropské unie jsou uváděny také v esperantu.

6.16 **J. Kavka:** *Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto konsiderataj nomenklature.* (30 Kč)

6.17 **KAEST '98:** *Kolokvo Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko.* Podrobný program a souhrny přednášek přednesených v Praze 13. až 15. 11. 1998 (15 Kč).

Du plej freŝaj verkoj:

- **L. Středa:** *Terminaro de feloj / Názvosloví kůží* (120 Kč)

Nový terminář v esperantu, angličtině, němčině, španělštině, ruštině, češtině a slovenštině.

- **Věra Ludíková:** *Ekaŭdi la animon / Uslyšet duši* (96 Kč)

Zrcadlové vydání esperantsko-české povídek a básní české básničky Věry Ludíkové v překladu Jaroslava Mráze a Miroslava Malovce.

*La librojn vi povas mendi je la adreso:*

**ESPERANTO - LIBROSERVO**

p. k. 1069

111 21 Praha

## Televida mini-enketo

La privata ĉeĥa televido Prima elsendas ĉiusabate amuzan programon „Neniu estas perfekta“, en kiu populara aktoro Jiří Krampol gastigas du aliajn (ge)-aktorojn. Ties tasko estas amuzi per rakontado spektantojn en la teatro kaj ĉe la televido, poste - kaj precipe - diveni, kiom el dek personoj demanditaj surstrate en unu urbo respondis ĝuste 6 demandojn. Ĉiam temas pri alia urbo (eĉ en eksterlando) kaj kompreneble pri aliaj demandoj. Tiuj ofte estas erarige simplaj kaj ŝercaj, ekzemple: „Ĉu ĉe suda poluso estas varme aŭ malvarme? El kiu materialo estas farita la akso de la ter? Kiom longe daŭris la tridekjara milito? En kiu jarcento okazis la unua mondmilito? Kio estas pornografio?“ kaj tiel simile, ordinare laŭ proponoj de la televidaj spektantoj. Komence de oktobro unu el la demandoj estis: „Kio estas Esperanto?“ Jiří Krampol unue demandis la spektantojn en la teatro: unuaj du demanditoj ne sciis, la tria - fremdulo parolanta peze la ĉeĥan - diris, ke Esperanto estis intencata kiel internacia lingvo. Poste oni prezentis videon, filmitan en Tunizio - 9 el la demanditoj sciis, eĉ beduenoj. La demandon aŭ sendis iu el niaj membroj aŭ ĝi estis reago je nova lunda filmserio en la ŝtata televido „Ranĉo ĉe la Verda Sepo“ pri travivaĵoj de familio en vilaĝo: ilia avino en malagrablaj situacioj dufoje grumblis, kial ŝi, majstranta stenografion kaj Esperanton, devas tiom suferi. La enketo pruvis, ke nia ĉeĥa publiko ne estas sufiĉe informita pri Esperanto.

## KALENDARO 1999 EN ĈEĤIO

### 1999

- mar.-05/07 Paroligaj kursoj  
maj.-15/16 Renkontiĝo Prostějov  
apr.-19 Lingva seminario Skokovy  
jul.-03/17 I-a etapo SET Lančov  
jul.-18/31 II-a etapo SET Lančov  
jul.-22/29 IMEK (medicinista konferen-  
co) en Opava  
jul.-24/31 SAT-kongreso Karlovy Vary  
aŭg.-01/15 III-a etapo SET Lančov  
aŭg.-07/08 ILEI-konferenco K. Vary  
sep.-18/19 XII-a E-tago Pardubice

## ESPERANTO-BIBLIOTEKOJ EN ĈEĤIO

- Brno:** Knihovna klubu esperantistů, ĉ. 3000 titoloj  
**Brno:** Moravská zemská knihovna, Kounicova 1, ĉ. 200 titoloj  
**Brno:** Knihovna Jiřího Mahena, Koblížná 4, ĉ. 30 titoloj  
**Česká Třebová:** Městské muzeum, esperantské oddělení, ĉ. 7000 titoloj  
**Liberec:** Státní vědecká knihovna, kelkdek libroj  
**Praha:** Klementinum, kelkdek libroj  
**Praha:** Městská knihovna, Mariánské nám., kelkdek libroj  
**Prostějov:** klub esperantistů, 574 titoloj  
**Prostějov:** Okresní knihovna, cca 30 titoloj  
**Třebíč:** Klub esperanta a jiných světových jazyků, knihovna Theodora Kiliana  
**Znojmo:** Esperanto-klub, ĉ. 50 titoloj  
**Znojmo:** Městská knihovna, Zámečnická 9, ĉ. 30 libroj

### ALVOKOJ

\* **KALENDARO.** Ĉar en la nuna jaro jam plurfoje okazis, ke dum la sama semajnfino du kluboj aŭ sekcioj okazigis siajn aranĝojn samtempe, sekve de kio en ambaŭ estis malforta partopreno, ni klopodos kunordigi la okazontajojn por 1999 sur ĉi tiu paĝo, por ke vi vidu, kiuj datoj estas ankoraŭ liberaj kaj kiuj okupitaj. Ni samtempe klopodos teni la aktulan staton en INTERNET sur la paĝo de Starto.

\* **BIBLIOTEKOJ.** En multaj publikaj bibliotekoj oni posedas ankaŭ librojn en Esperanto, sed se ili ne estas pruntataj, oni elfetas la librojn. Estus bone, se nia asocio tenus supervidon pri bibliotekoj (publikaj kaj klubaj), kiuj posedas librojn en Esperanto (komence sufiĉas nomo de biblioteko kaj proksimuma nombro de libroj). Ankaŭ tiun informon ni tenos kaj aktualigos en interreto.

\* **KURSOJ.** En INTERNET ni povas publikigi ankaŭ viajn kursojn, se vi sendos sciigon al la redaktoro.

Odesílatel:

Český esperantský svaz  
ESPERANTO, p. s. 1069

111 21 Praha 1

**Internet:** cea @ tnet. cz

www.kuk.cz/cea/

☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (29. ročník)

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto

Členská evidence a změny adres: Květa Krajíčková, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (29-a jarkolekto)

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 18 gld

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail: starto @ clavis.cz; www.clavis.cz/starto

Presis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno

Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,  
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

ISSN 1212-009X

# **NOVINOVÁ ZÁSILKA**

Poštovné hrazeno v hotovosti  
u pošty 746 01 Opava 1